

Johann Wolfgang von Goethe, Same	Johann Wolfgang von Goethe, Egalaĵo (Noktokanto de mi-granto)	Johann Wolfgang von Goethe, Super montoj regas kviet'	Johann Wolfgang von Goethe, Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)
-------------------------------------	--	--	---

tradukita de Pejno Simono

tradukita de Manfredo Ratislavo

tradukita de Poul Thorsen

Super montopintoj —
silent',
tra pinoplingloj
la senvent'
spiras sen fort';
arbare la birdoj ek-
mutas.
Pretu, aludas
silento pri mort'.

Super ĉio iĝas
Kviet',
Kaj ne moviĝas
Pro ventet'
Iu foli';
Silentas la birdoj
ĉirkaŭe.
Atendu — baldaŭe
Ripozos vi.

Super montoj
regas kviet',
tra l' foliaro
nur ventet'
spiras kun trem'.
Birdoj arbare si-
lentas,
se vi atendas,
pacas vi mem.

Über allen Gipfeln
Ist Ruh,
In allen Wipfeln
Spürest du
Kaum einen Hauch;
Die Vögelein schweigen im
Walde.
Warte nur, balde
Ruhest du auch.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de PEJNO SIMONO (Simon Edward Adrian Payne, *1941-12-23).*

Arg-356-1974 (2014-03-14 14:12:56)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe>.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1983-01.*

MR-03-4 / Arg-356-707 (2006-03-20 14:44:12)

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de POUL THORSEN (*1915-01-07 - †2006-01-30).*

Arg-356-708 (2010-05-28 21:34:24)

Poul Thorsen estis dana Esperantista poeto, kiu verkis multajn originalajn kaj tradukitajn poeziaĵojn en la Internacia Lingvo. Vidu ankaŭ: <http://www.poulthorsen.dk/> kaj <http://www.liberafolio.org/2006/forpasis-poul-thorsen/view>.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22).*

Arg-356-705 (2013-12-12 22:17:04)

Verfasst am 6./7. September 1780 auf dem Kickelhahn (Gickelhahn) bei Ilmenau (Thüringen), wo Goethe die Verse mit Bleistift an die Bretterwand einer Jagdhütte schrieb. (Anm. d. Hrg.) Goethe verkis tiun ĉi poemon je la 6./7. de Septembro 1780 sur la monto Kickelhahn ĉe Ilmenau en Turingio (Germanio). Tie li skribis la versojn per kraĵono sur la tabulo-vandon de ĉasista kabano. (rimarkigo de l' eldoninto)